Mi Lernas Esperanton

Nydia Aydos Krieger
Sarmento Leite nº 997
90.050 Porto Alegre - rs

E S P E R A N T O

Esperanto é a língua auxiliar, neutra, internacional, criada pelo médico polonês LÁZARO LUIZ ZAMENHOF, nascido, em 15 de dezembro de 1859, em Bialistoc.

Esperanto é uma língua auxiliar porque não pretende eliminar as línguas nacionais, mas servir como segunda língua de todos, para ser usada como instrumento de comunicação entre pessoas que falam línguas diferentes.

É neutra porque não pertence a nenhuma facção política ou religiosa.

É uma língua internacional porque em seu seio se encontram raízes das principais línguas europeias.

Em 1887, Zamenhof publicou uma brochura (sob o pseudônimo de Doutor Esperanto) que denominou - Língua Internacional - Prefácio e Manual Completo.

.-.-.-.-.-.-.-.-

HEJMA TASKO:

Responda, em seu caderno, as seguintes questões:

O que é Esperanto?
Por que dizemos que Esperanto é língua neutra?
Por que dizemos que é língua auxiliar?
Por que dizemos que é língua internacional?
Quem foi seu criador?
Onde nasceu seu criador?
Em que ano?
Em que ano foi lançado o Esperanto?

P R O N Ú N C I A

As letras a,b,d,e,f,i,k,l,m,n,o,p,t,u,v e z são iguais em português e em ESPERANTO.

Consoantes que apresentam pronúncia diferente em Português e em ESPERANTO:

c = (tso); exemplo: citrono, paco, laca, cigaro.
ĉ = (tcho); ex. : ĉemizo, ĉevalo, ĉambro, ĉu.

g = (pronuncia-se sempre como em "gato"); ex.: geografio
ĝ = (djo); ex.: ĝardeno, ĝirafo, aĝo.

j = (iô); ex.: fajro, jaro, sinjoro, floroj. (Pronuncia-se sempre como i breve).
ĵ = (jô); ex.: ĵurnalo, ĵaŭdo.

h = (é aspirado); ex.: horo, homo, hotelo.
ĥ = (som aspirado forte); ex.: ĥoro, ĥemio.

r = (é sempre dental e nunca gutural como em Roma; tem sempre o mesmo som, no início e no meio da palavra).Ex.: rato, rapida, kara.

s = (tem som de ç); ex.: taso, deserto
ŝ = (tem som de ch); ex.: ŝuo, ŝafo, ŝipo, ŝi.

ŭ = (u com bráquia é semi-vogal: pronuncia-se numa só emissão de voz com a vogal que a antecede) ex.- aŭtomobilo, ankaŭ, morgaŭ, ankoraŭ, hieraŭ.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-

OBSERVE QUE:

Cada vogal constitui uma sílaba;
A acentuação tônica cai sempre na penúltima vogal;
A letra j (lida como i breve) colocada no fim da palavra, forma o plural.
A letra a é sempre igual, não anasala perto de m o ou n .

Leia em voz alta: Ameriko, Azio, Afriko, Oceanio, foiro, soifo, balailo, junio, julio, vojaĝo, ŝnuro, Japanujo, Germanujo, manĝi, infano, banano, ĉinujo, generalo, hodiaŭ, hieraŭ, Paŭlo, Johano, piramido, fajro, naiva, rapida, krudela, ŝtoneca, boneco, eleganta.

OBSERVE AINDA QUE:

Os substantivos terminam sempre em o.
Os adjetivos terminam sempre em a.

S A L U T O J

Bonan tagon!
Bonan vesperon!
Bonan nokton!
Bonan posttagmezon!
Bonan matenon!
Adiaŭ!
Saluton!.
Ĝis revido!
Ĝis baldaŭ!

KELKAJ ESPRIMOJ

Jes.
Ne
Eble
Pardonu.
Pardonon.
Mi dankas.
Dankon.
Ne dankinde.
Permesu.
Plezure.
Sanon.
Toston.
Je via dispono.

Kiu

OS ALUNOS SE APRESENTAM:

(LA GELERNANTOJ INTERPREZENTIĜAS:)

- Kiu vi estas?
- Mi estas ..... kaj vi?

DEMANDU VIAN KOLEGON AŬ VIAN KOLEGINON:

- Kiel vi fartas?
- Mi fartas bone, dankon.
- Ĉu vi bonfartas?
- Jes, mi bonfartas, dankon.
- Kiel via familio fartas?
- Ĝi fartas bone, mi dankas.

KIEL VIA { patro / filo / avo / onklo / kuzo / nepo / nevo / edzo / frato } FARTAS?

As formas femininas são formadas com o sufixo:

- IN

Ex.: patro - patrino avo - avino

O parentesco por casamento forma-se com o prefixo:

- BO

Ex,: bopatro, bopatrino, bofilo, bofrato

la patro
la patrino
la filo
la filino
la patro staras
la patrino sidas
la filo sidas sur
la planko.

La filino staras ĉe la fenestro.
La filo sidas sur la planko.
La patrino sidas sur seĝo.
La patrino sidas sur la seĝo.
Inter la patro kaj la patrino estas tablo.
Sur la tablo estas vazo.
Estas floroj en la vazo.
Estas kurteno ĉe la fenestro.
La patro estas edzo de la patrino.
La patrino estas edzino de la patro.
Estas bildo sur la muro.

INTERPAROLADO : Pri parencaro.

HEJMA TASKO: En via kajero skribu:

a) la inan formon de la parencaro;
(a forma feminina dos parentes);

b) la pluralan formon de la parencaro;
(a forma plural dos parentes);

c) Traduku.
(Traduza).

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

TRIA LECIONO

P E T R O

KAJ

P E T R I N O

Petro estas knabo.
Petrino estas knabino.

Petro kaj Petrino estas geknaboj. *ge-*
Petro estas frato de Petrino
Petrino estas fratino de Petro.
La patro kaj la patrino de Petro estas gepatroj.
La gepatroj de Petro estas ankaŭ gepatroj de Petrino.

EN LA ZOOLOGIA GARDENO *Kio*

Petro kaj Petrino iras al Zoologia Gardeno. Ili promenas. En la Zoologia Gardeno estas arboj. Tie ankaŭ estas lago. En la lago estas anseroj. Sur la arboj estas birdoj kaj simioj. La simioj saltas kaj ludas. La papago parolas. La leono kaj la tigro estas sovaĝaj bestoj. La fiŝo naĝas. La elefanto estas granda. La fiŝo estas malgranda. La testudo iras malrapide, tre malrapide. Ankaŭ la limako iras malrapide.

Aliaj bestoj estas: abelo, formiko, muso, rato, serpento, bufo, urso, ĝirafo, azeno, ĉevalo, bovo, lupo, leporo, ŝafo.



-ido

Ido de hundo estas hundido.
Ido de kato estas katido.
Ido de leono estas leonido.
Ido de koko estas kokido.
Ido de simio estas simiido.

INTERPAROLADO

Kio estas Petro? Kio estas Petrino?
Ĉu la edzino de fiŝo estas fiŝino?
Ĉu la simio saltas?

Ĉu vi povas traduki la vortojn: abelo, muso, ĉevalo?

KIO estas tigro? - Tigro estas besto.
KIO estas .....? - Ĝi estas besto.
- Ĝi estas sovaĝa besto.
- Ĝi estas doma besto.
- Ĝi estas dombesto.

hundo

kato

bovino

ĉevalo

porko

meleagro

kokino

koko

anaso

estas domaj bestoj.

leono

tigro

ĝirafo

elefanto

urso

vulpo

lupo

cervo

ne estas domaj bestoj

HEJMA TASKO:

En via kajero skribu:

1. La inan formon de konataj bestoj.
2. La pluralan formon de idoj de bestoj.
3. Traduku.

Ekzemplo:
bovo, bovino, bovidoj (boi, vaca, terneiros).
urso, ursino, ursidoj (urso, ursa, filhotes de urso).

KVARA LECIONO

-uj Kie

KRESKAĴOJ

La geknaboj iras al Botanika Ĝardeno.
Tie estas multaj kreskaĵoj.
La arbo kie estas oranĝo estas oranĝujo.
La arbo kie estas piro estas pirujo.
La arbo kie estas pomo estas pomujo.
La kreskaĵo kie estas fragoj estas fragujo.
Kie estas la banano? - Sur la bananujo.
Kie estas la ananaso? - Sur la ananasujo.
Kie estas la persiko? - Sur la persikujo.
Kie estas la avokado? - Sur la avokadujo.

KIO estas oranĝo? - Oranĝo estas frukto.
KIO estas frago? - Frago estas frukto.

Aliaj fruktoj estas: melono, pruno, citrono, vinbero.
KIE estas la melono? - La melono estas sur la melonujo.
KIE vi loĝas? - Mi loĝas en Porto Alegre.
KIE estas la simio? - Ĝi estas sur la arbo.
KIE estas la libro? - Ĝi estas tie.
KIE estas la ombrelo? KIE estas mia ombrelo?
Kie estas la pluvombrelo? .....la sunombrelo?
KIU estas la fratino de Petro? - Petrino.
KiU estas la frato de Petrino? - Petro.
KIUJ iras al Botanika Ĝardeno?
KIO estas tie?
KIO estas leono?

mal-

Ĉu la banano estas dolĉa aŭ acida?

KIA estas la oranĝo? - Ĝi estas dolĉa.
Kia
Ĝi estas granda.
Ĝi estas flava.
Ĝi estas bongusta, mola, verda, matura, nematura, putra, malmola, malgranda malbongusta, maldolĉa.

KIA estas la fraŭlino? bela - malbela
alta - malalta
ĉarma, blonda, dika.

dika - maldika
pura - malpura
juna - maljuna
hela - malhela

RIMARKO: Os adjetivos terminam em a.
La adjektivoj finiĝas per a.

INTERPAROLADO:

Ĉu Petro iras al Botanika Ĝardeno?
Ĉu Petrino iras al Botanika Ĝardeno?
Ĉu la geknaboj iras al Botanika Ĝardeno?
Kio estas vinbero? - Vinbero estas frukto de vinberujo.
Kiuj iras al Botanika Ĝardeno?
Ĉu la pomo estas sur pirujo?
Kie estas la pruno?
Kie vi estas?
Ĉu la sunombrelo estas ĉe la pluvombrelo?
KIA estas la domo? (Alta aŭ malalta?
larĝa aŭ mallarĝa?
pura aŭ malpura?
hela aŭ malhela?)
Kia estas Petro? (Laborema aŭ mallaborema?
rapida aŭ malrapida?
gaja aŭ malgaja?)

HEJMA TASKO:

En via kajero:

a) skribu la nomon de fruktoj kaj ĉe ili la nomon de la arboj respektivaj;
Ekzemplo: piro - pirujo.

b) Faru demandojn per KIA kaj respondu;
Ekzemplo: Kia estas Petrino?
- Petrino estas bela.

c) Donu la a-formon kaj traduku: frato, paco, mar vintro, Dio.
Ekzemplo: frato - frata = fraterno.
suno - suna = ensolarado
Lumo - luma = luminoso

KVINA LECIONO

KANTI

Hodiaŭ mi kantas.
Hieraŭ mi kantis.
Morgaŭ mi kantos. } (x)

SEZONOJ DE LA JARO

Estas kvar sezonoj.
La sezonoj estas: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro.

En Brazilo printempo komenciĝas je septembro; somero je decembro; aŭtuno je marto kaj vintro je junio.

Printempo estas plena de floroj. Dum somero la vetero estas varma, la suno brilas. Dum aŭtuno la vetero estas malpli varma, falas la folioj. Dum vintro estas pluvo kaj malvarmo.

.-.-.-.-.-.-.-.

KIA semo, TIA la frukto.

KIA la semo, TIA la frukto.

INTERPAROLADO

Kia estas printempo? - Ĝi estas bela.
Kia estas somero? - Ĝi estas varma.
Kia estas aŭtuno? - Ĝi estas malvarmeta.
Kia estas la vintro? - Ĝi estas malvarma.

Hejma Tasko: En via kajero kopiu (x) kaj poste uzu la verbojn: salti, ludi, paroli, iri, naĝi, dormi, manĝi, trinki.

2. Traduku.

Ekzemplo: Hodiaŭ mi saltas = Hoje eu salto
Hieraŭ mi saltis =Ontem eu saltei
Morgaŭ mi saltos = Amanhã eu saltarei.

.-.-.-.-.-.-.

SESA LECIONO

MONATOJ DE LA JARO

Estas dek du monatoj en la jaro:
JANUARO estas la unua monato en la jaro.
FEBRUARO estas la monato de karnavalo.
En MARTO komenciĝas la lernjaro.
En APRILO la kuniklo venas kun donacoj.
MAJO estas monato de rozoj.
JUNIO estas monato de brulejoj.
En JULIO la gelernantoj libertempas.
En AŬGUSTO rekomenciĝas la lecionoj.
En SEPTEMBRO venas la printempo.
En OKTOBRO estas la Tago de la Besto.
En NOVEMBRO estas Tago de Mortintoj.
DECEMBRO estas la lasta monato de la jaro; estas ankaŭ la monato de Kristnasko.

.-.-.-.-.-.-.-.

DERIVITAJ ADVERBOJ

Dolĉa - doce;
dolĉe - docemente;
gaja - alegre;
gaje - alegremente

rapide - rapidamente
rapida - rápido
bona - bom
bone - bem

INTERPAROLADO

- Kiuj estas la unua kaj la lasta monato de la jaro?
- Kiu monato venas antaŭ februaro?
- Kiu monato venas post junio?
- Kio okazas en oktobro?
- Kio okazas en februaro?
- Kio okazas en decembro?
- En kiu monato vi naskiĝis?
- Kiu estas la diferenco inter naski kaj naskiĝi?
- Kiam komenciĝas la lernjaro?
- Kiam ĝi finiĝas?

HEJMA TASKO: Skribu tri demandajn frazojn pri monatoj kaj ilin respondu.
(Escreva 3 frases interrogativas sobre meses e responda-as).

2. Respondu la demandojn per kompletaj frazoj:

Kie vi estas nun?
Ĉu vi staras aŭ sidas?
Ĉu estas fenestro ĉe la muro?
Ĉu vi lernas?
Ĉu somero estas agrabla sezono?

.-.-.-.-.-.-.-.

SEPA LECIONO

LA AKUZATIVO

Na frase:
"O LEÃO MATOU O TIGRE",
quem matou? - O leão.
Mas na frase:
"O TIGRE MATOU O LEÃO",
quem matou? - O tigre.
Em PORTUGUÊS, a ordem direta é:
1º) - quem pratica a ação (sujeito);
2º) - o verbo;
3º) - quem sofre a ação (objeto direto);

O que está colocado em primeiro lugar é o que pratica a ação.

Em ESPERANTO, quem sofre a ação recebe um n no final da palavra. Pode-se, assim, alterar a ordem das palavras na frase, sem modificar o sentido.

LA LEONO MORTIGIS LA TIGRON, tem o mesmo significado que:

LA TIGRON MORTIGIS LA LEONO.

Isto é, porque quem sofreu a ação é o que recebe o n, não importando a colocação na frase.

Outros exemplos:
La instruisto prenas la kreton.(Prenas kion?)
Karlo petas pardonon. (Petas kion?)
Petro stiras aŭtomobilon. (Stiras kion?)

Os adjetivos que constituem o objeto direto também recebem o n. Ex.:

La gelernantoj rigardas la verdan tabulon.
Eva aĉetis novajn ŝuojn.
La sinjoro vendis putrajn pirojn.
La kudristino kudras belajn vestojn.
La kantistino kantis belan kanzonon.
La fraŭlo legis dikan libron dum la nokto.
La almozulo petis monon de fraŭlino.
Li manĝis flavan, grandan, parfumitan kaj bongustan oranĝon.
Multajn nubojn li vidis sur la ĉielo.

La karoton li plantis = Li plantis la karoton.
Mi komprenas la lecionon. Li diris tion.
Ŝi faris longan promenadon.
Li diris tion. Li diris ĉion.

Ni legis interesan libron.
Libron interesan ni legis.
Interesan libron ni legis.
Legis ni interesan libron.

João espancou Paulo = Johano batis Paŭlon.
Paŭlon batis Johano.
Batis Paŭlon Johano.

Paŭlo stiras aŭtomobilon.
Petro ŝovas Paŭlon.
Judita puŝas Petron.

.-.-.

HEJMA TASKO:

Skribu la jenajn frazojn kaj metu akuzativon, kie ĝi estas necesa:



Oni vidis bela blua ĉielo super la maro.
Li manĝis la kuko de Adamo.
Li trinkis flava kaj ŝaŭma biero post vespermanĝo.

.-.-.-.-.-.-.

OKA LECIONO

TAGOJ DE LA SEMAJNO

Estas sep tagoj en la samajno: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. Lundo estas labora tago. Mardo venas post lundo. Merkredo estas en la mezo de la semajno. Ĵaŭdo venas antaŭ vendredo. Sabato venas antaŭ dimanĉo.

La derivitaj adverboj finiĝas per e.

No domingo = dimanĉe; no sábado = sabate.
Sabate mi lavas vestojn, dimanĉe mi promenas.

- DIS

Adamo ĵetis ŝtonon tra la fenestro.
La vento disĵetis la foliojn.

La fraŭlino disdonis ludilojn al la malriĉaj infanoj. La infano koleris kaj disŝiris la pupe - ton. La gefiloj disdividis la patran vestaron inter si. La glaso falis kaj disrompiĝis.

INTERPAROLADO

BOnvolu respondi laŭte kaj kuraĝe:
- Kiu tago venas post sabato? ... post vendredo?
- Kiu tago venas antaŭ dimanĉo? ... antaŭ lundo?
- Kiu monato estas la unua?.... la tria? ... la lasta?
- Kiom da tagoj estas en la semajno?

.-.-.-.

HEJMA TASKO:

a) Enkonduku la jenajn fra - zojn per "BONVOLU":

Venu tuj post mi.
Donu al mi tion.
Sidiĝu.
Ekstaru.
Levu viajn brakojn.
Prenu vian jakon.
Lasu la kajeron
Sendu al mi bildkarton.
Skribu ne per krajono sed per plumo.
Ekz.: Bonvolu veni tuj post mi.

b) Skribu la de - mandojn.

..... ? Jes, la leono estas sovaĝa besto.
..... ? Jes, la hundo estas dom besto.
..... ? Ne;hieraŭ ne pluvis.
..... ? Ne; la seĝo ne estas rompita

NAŬA LECIONO

Kiom

KIOM = QUANTO

Kiom kostas la libro? Kiom kostas la vojaĝbileto?
Kiom kostas la ĵurnalo? Kiom kostis la televidilo?
Kiom mi ŝuldas al vi? Kiom mi devas pagi?
Kiom vi bezonas por manĝi?

Kiom da

KIOM DA = QUANTO(S)
(Antecede substantivo)

Kiom da gekolegoj estas en la lernoĉambro?
Kiom da kolegoj estas en la lernoĉambro?
Kiom da koleginoj estas en la lernoĉambro?
Kiom da tagoj estas en superjaro?

Kioma

KIOMA

Kiom? - Unu, du, tri..
Kioma?-Unua, dua, tria...

- En kioma klaso vi lernas?
- En la tria.
- Sur kioma benko vi sidas?
- Sur la dua.
- Kioma horo estas?
- Estas la unua.
- Sur kioma etaĝo vi loĝas?
- Sur la dua.

-Kiom da pluvaj tagoj estis en la lasta jaro?
-Mi ne scias.

INTERPAROLADO:
Nombru la fenestrojn de la ĉambro.
Ĉu vi povas nombri la pordojn?
Ĉu vi povas nombri la tablojn?
Ĉu vi povas nombri la fenestrojn?

HEJMA TASKO: a) Kopiu kaj respondu la demandojn:

Kiom da monatoj estas en jaro?
Kiom da tagoj estas en semajno?
Kiom da veraj amikoj vi havas?

b) Skribu la demandojn:

..... ? Mi aĉetis 3 librojn.
..... ? Estas la sesa.
..... ? La libro kostis dekmil kruzejrojn.
..... ? Mi bezonas por manĝi dekmil kruzejrojn.
..... ? En la ĉambro estas du ŝrankoj.
..... ? En la semajno estas sep tagoj.

.-.-.-.-.-.

DEKA LECIONO

PREPOZICIOJ



La blanka kato de Paŭlo estas sur la seĝo.
La vazo estas sur la tablo.
La floroj estas en la vazo.
La hundo estas sub la tablo.
La lampo pendas super la tablo.

sur

La krajono estas sur la libro.



sub

La krajono estas sub la libro.
Ĝi estas en la libro.
Ĝi estas antaŭ la libro.
Ĝi estas malantaŭ la libro.
Ĝi estas ĉe la libro.
La tablo estas inter la kato kaj la pordo.
Ni skribas per krajono.

en

antaŭ

malantaŭ

ĉe

La krajono estas inter du libroj.

Mi iras al la lernejo per buso kaj revenas el tie piede.

Inter Petro kaj Paulo estas granda amikeco.

Ŝi iras kun jako kaj sen ĉapelo.

INTERPAROLADO: (Kie estas ... ?)

HEJMA TASKO: a) Faru 3 frazojn kaj uzu konatajn prepoziciojn.

b) Skribu la demandojn?

..... ? - Mi vojaĝas per aviadilo.
..... ? - Mi skribas per kreto.
..... ? - La plumo estas inter la krajonoj.
..... ? - Mi venas el la lernejo.
..... ? - La libro estas de Petro.
..... ? - Ne; la hundo estas malantaŭ la domo.
..... ? - Ne; li estis sen ĉapelo.

.-.-.-.-.-.-.-.

DEK-UNUA LECIONO

HOMA KORPO

La kolo estas inter la kapo kaj la trunko.

A - kapo
B - vango
C - kranio
D - kolo
E - ŝultro
F - brako
G - mano
H - fingroj
I - brusto
J - ventro
K - kruro
L - piedo



La brusto kaj la ventro estas en la trunko . En la brusto es - tas la pulmoj kaj la koro. Ĉe la fino de la brakoj estas la manoj, kie estas la fingroj.

Per la fingroj oni povas palpi. Per la piedoj oni povas kuri, marŝi, salti.

LA KAPO



A - hararo
B - frunto
C - okuloj
D - nazo
E- buŝo
F - mentono
G - orelo
H - vango

- Kie estas la kapo? - La kapo estas sur la kolo
- Kie estas la cerbo? - Ĝi estas en la kranio.
- Per kio oni flaras? - Oni flaras per la nazo.
- Per kio oni vidas? - Oni vidas per la okuloj.
- Per kio oni parolas? - Oni parolas per la buso.
- Per kio oni aŭdas? - Per la oreloj.
- Kie estas la nazo? - La nazo estas inter la oku - loj kaj la buŝo.
- Kie estas la manoj? - Ili estas je la fino de la brakoj.
- El kio konsistas la kapo? - La kapo konsistas el kranio kaj vizaĝo.
- Kie vi metis miajn ŝuojn? -Per kio vi venis al la lernejo? - Per kio vi veturas? Per kio vi kudras?

DIVENAĴO

Stefano demandis al Marta la jenan enigmon:
Ĝi havas okulojn kaj ne vidas;
Ĝi havas orelojn kaj ne audas;
Ĝi havas orelojn kaj ne aŭdas;
Ĝi havas nazon kaj ne spiras;
Ĝi havas buŝon kaj ne manĝas;
Ĝi havas piedojn kaj ne iras.
KIO ĜI ESTAS?
Marta tuj divenis - LA PUPO!

INTERPAROLADO:
Per la menciitaj frazoj.

HEJMA TASKO:
Faru 5 kompletajn frazojn pri homa korpo.

.-.-.-.-.-.-.-

DEK - DUA LECIONO

- EM - em

Kiu ŝatas labori estas laborema.
Kiu ŝparas monon estas ŝparema.
Kiu facile ploras, estas plorema.
Kiu ĉiam ridas estas ridema.
Kiu tro multe parolas estas parolema.
Kiu parolas pri negravaj aferoj - babilas.
Kiu multe babilas estas babilema.
Kiu kredas ĉion estas kredema. ÷oni÷
Se oni ne ŝatas labori, oni estas mallaborema.
Se oni bone lernas la tutan lecionon, oni estas lernema. Se oni multe manĝas, oni estas manĝema.
Se oni manĝas frandaĵojn, oni estas frandema.

INTERPAROLADO

Kia estas la homoj, kiuj ĉiam ridetas?
Kia estas tiu, kiu multe babilas?
Kia estas tiu, kiu multe parolas?

Kiu vi estas?
Kio vi estas?
Kio estas sur la tablo?
Kioma horo estas?
Kiom da gefratoj vi havas?
Kie vi logas?

HEJMA TASKO: Skribu la frazojn de "INTERPAROLADO" kaj respondu ilin.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-

DEK-TRIA LECIONO -isto



- ISTO

METIOJ KAJ PROFESIOJ

La kuiristo kuiras; la kuiristino ankaŭ kuiras. Ŝi laboras ĉe la forno kaj per bol poto, bolkruĉo, pato, tranĉilo, supkulerego...

La ĝardenisto laboras en la ĝardeno.
La forĝisto forĝas.
La lignaĵisto faras lignaĵojn.
La meĥanikisto zorgas pri la motoroj.

La ŝuisto faras ŝuojn.
La ŝuriparisto riparas ŝuojn.
La ŝuvendisto ilin vendas.

Kion faras la kuiristo?
Kion faras la kuiristino?
Kio estas en la kuirejo?
Kie laboras la ĝardenisto?
Kie estas la ĝardeno?

Kion vendas la ŝuvendisto?
Kie estas la supkulerego?
Por kio taŭgas la tranĉilego?
Kion faras la kudristino?
Kion faras la masonisto?
Kie laboras la tipografiisto?
Per kio laboras la tajloro?-Li laboras per kudrilo, fadeno kaj tondilo.

La maristo laboras en ŝipo.
La advokato studas la leĝojn.
La dentisto kuracas la dentojn.
La inĝenieroj desegnas la planojn, kalkulas pri domoj, pontoj, kaj vojoj. La kuracisto kuracas la malsanulojn.

INTERPAROLADO

(Per la menciitaj frazoj).

HEJMA TASKO

A) - Faru demandajn frazojn rilate al la 4 lastaj linioj de la teksto.
B) - Faru frazon pri ŝuisto.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

DEK-KVARA LECIONO

NUMEROJ

+ Ĉu vi povas kalkuli de unu ĝis dek?
- Jes; mi povas:

1 unu	6 ses
2 du	7 sep
3 tri	8 ok
4 kvar	9 naŭ
5 kvin	10 dek

- Kaj post dek, ĉu vi kalkulas?
- Jes, jen: 11 dek unu
12 dek du
13 dek tri

15 dek kvin
.....
19 dek naŭ
2o dudek
21 dudek unu
22 dudek du
.....
29 dudek naŭ
3o tridek
31 tridek unu
4o kvardek
5o kvindek
6o sesdek
7o sepdek
8o okdek
9o naŭdek
1oo cent
2oo ducent
1.5oo unu mil kvincent



Poŝhorloĝo



Murhorloĝo

- Kaj la ordaj numeraloj kiel oni diras?
- Tio estas facila afero: Oni aldonas la literon "a":

1a unua
2a dua
10a deka
11a dek-unua
12a dek-dua
2oa dudeka
21a dudek-unua
1ooa centa

Brakhorloĝo

LA HORLOĜO

- Kio estas horloĝo? - Horloĝo estas aĵo por montri la horojn.
- Kiajn horloĝojn vi konas? - Mi konas poŝhorloĝon, brakhorloĝon, murhorloĝon, turhorloĝon, vekhorloĝon,

Vekhorloĝo

- Kio estas la turhorloĝo? - Ĝi estas horloĝo kiun oni vidas sur turo.
- Por kio oni uzas vekhorloĝon?
- Oni uzas vekhorloĝon por vekiĝi je signita horo.

INTERPAROLADO

- Kioma horo estas? - Estas la deka
- Estas la oka kaj dudek minutoj.
Estas dek minutoj antaŭ la kvina.
Estas dek minutoj post la sepa.
k.t.p.

HEJMA TASKO: Desegnu 3 horloĝojn kaj skribu la montratajn horojn.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-

DEK-KVINA LECIONO

- ON -on

$\frac{1}{2}$ = duono	$\frac{1}{6}$ = sesono	$\frac{1}{10}$ = dekono
$\frac{1}{3}$ = triono	$\frac{1}{7}$ = sepono	$\frac{1}{12}$ = dekduono
$\frac{1}{4}$ = kvarono	$\frac{1}{8}$ = okono	$\frac{1}{13}$ = dek-triono
$\frac{1}{5}$ = kvinono	$\frac{1}{9}$ = naŭono	$\frac{3}{10}$ = tri dekono

Tri estas duono de ses.
3 estas $\frac{1}{2}$ de 6.

Kvin estas triono de dek kvin.
5 estas $\frac{1}{3}$ de 15.

3 estas triono de 9.
5 estas duono de 10.
4 estas duono de 8.
10 estas dekono de 100.

KIOMA HORO ESTAS?



Estas la dua akurate



Estas la tria kaj duono

Tagmezo (aŭ) Noktomezo

Estas kvarono antaŭ la sepa

Estas la oka kaj dek minutoj.

Estas dek minutoj post la oka.

.-.-.-.-.-.-.--.

DEK-SESA LECIONO



1/4



du duonoj da orango

kvarono da botelo

kvinono da pano



1/6



sesono da kuko

Mi ricevis seponon da kuko tre bongusta.

Li dividis la ĉokoladon inter la geknaboj po okono al ĉiu.

D A

Li petis iom da pano.
Aldonu du tasojn da faruno.

- A Ĵ O - aĵo

Dolĉaĵo estas aĵo dolĉa. Trinkaĵo estas aĵo por trinki. Manĝaĵo estas aĵo por manĝi. Teatraĵon oni vidas en la teatro. Li akiris kelkajn esperantaĵojn. La kudristino havas ĉiam novaĵojn por montri. Ĉe la ekzameno ŝi nur diris stultaĵojn. La skribaĵo estas erara.
Aĵo el vitro estas vitraĵo.
Aĵo el fero estas feraĵo.

- O P - op

La instruisto ordonis, ke ili marŝu duope.
Por bone fari tiun tasĥon ili devas labori triope.
Ĉu vi kuraĝas eniri arbaron duope?
La ĝemeloj ludis ĉiam duope.



- uj - U J

a) La franco naskiĝis en Francujo kaj la italo en Italujo.
b) La kreskaĵo, kiu donas frukton portas la sufikson -UJ:
Pomujo donas pomojn al ni. Pirujo donas pirojn. La frukto de bananujo estas banano. La frukto de fragujo estas frago. La frukto de ananasujo estas ananaso. La frukto de persikujo estas persiko. La frukto de prunujo estas pruno.

c) -UJ estas ankaŭ sufikso por objekto, kiu entenas aĵon montratan de la radiko:
sukerujo entenas sukeron; salujo entenas salon; piprujo entenas pipron; monujo, monon; supujo, supon.

-AN - an

Mi estas kristano, mia majstro estas Kristo.

Mi naskiĝis en Brazilo do mi estas brazilano. Ankaŭ mia fratino naskiĝis en Brazilo: Ŝi estas brazilanino. Kiu naskiĝis en Ĉilio estas ĉiliano; Kiu naskiĝis en Venezuelo estas venezuelano; se en Paragvajo, paragvajano.

Se mi estas ano de klubo, mi estas klubano. Se mi loĝas en kamparo, mi estas kamparano. Se mi lernas en gimnazio, mi estas gimnaziano; se vi loĝas en urbo, vi estas urbano. Se vi estas ĉe la sama klaso, vi estas samklasano. Se vi loĝas en la sama lando vi estas samlandano.

INTERPAROLADO: Kio estas kamparano? - Kamparano estas loĝanto en kamparo. - Kio estas klubano? - Klubano estas ano de klubo.- Kio vi estas se vi loĝas en la sama urbo? - Se ni loĝas en la sama urbo ni estas samurbanoj.
- De kiam vi ne vidas teatraĵon?
-Ĉu vi preferas dramon, komedion aŭ tragedion?
-Kaj pri kino:Ĉu vi tre ofte vizitas kinejon?
-Kian filmon vi preferas? Ĉu pri aventuro aŭ sciencfikcio?
- Ĉu vi ploras, kiam vi rigardas malgajan filmon?
- Ĉu vi ŝatas filmojn pri sovaĝaj bestoj?

HEJMA TASKO: Kopiu kaj respondu, per kompletaj frazoj, la faritajn demandojn en INTERPAROLADO.

2. Kio estas tiu, kiu naskiĝis en Italujo? Ĉinujo? Grekujo, Svedujo, Japanujo?
Kio estas tiu, kiu naskiĝis en Meksikio, Kanado Kosta-Riko, Kubo?

DEK-SEPA LECIONO

-et -E T -R G -eg

ridetas

ridas

ridegas

ploretas

ploras

ploregas

Sur la bildo oni vidas tri ridemajn virojn kaj tri ploremajn virojn. En la unua vico la unua viro ridetas, la dua viro ridas kaj la tria viro ridegas.

En la dua vico, la unua viro ploretas, la dua ploras kaj la tria ploregas.



Sur la tablo la kulero estas inter la kulereto kaj la kulerego.

- Kion vi preferas: logi en dometo aŭ en domego?

- Por viziti Cearaon ĉu vi devas fari vojaĝegon?

- Kial ploras la infaneto?

Ĉu la domo havas ĝardeneton?
Ĉu la Amazona arbarego estas densa kaj bela?

-A R -ar

Safaro estas aro da safoj.

Ĉevalaro estas aro da ĉevaloj.Bovaro estas aro da bovoj. Kataro estas aro da katoj. Trajno konsistas el lokomotivo kaj vagonaro. Kia belaĵo estas flugo de birdaro!

INTERPAROLADO

(Per la menciitaj frazoj).

HEJMA TASKO

a) Skribu la pligrandigon kaj la diminutivon de la subaj vortoj:
libro, kato, strato, arbaro, rivero, horloĝo, kaĝo, pordo.
b) Traduku.

.-.-.-.-.-.-.

DEK-OKA LECIONO

Kiel ? -e

Kiel iras la leporo? - La leporo iras rapide.
Kiel iras la testudo? - La testudo iras malrapide.
Kiel kantas la sabiao? - Ĝi kantas belsone.
Kiel dancas la dancistino? Ŝi dancas gracie.
Kia ŝi estas? - Ŝi estas gracia.
Ĉu la kantistino kantas laŭte? - Jes, la kantistino kantas laŭte; ŝia voĉo estas alta, laŭta kaj agrabla.

- Kiel ni intersalutas? - Ni intersalutas esperante.

- A D - ad

Ĉi tie la preferataj sportoj estas: naĝado, kurado, saltado, teniso kaj futbalo.
Niaj ĉefaj sentumoj estas vidado, aŭdado, flarado, gustado kaj palpado.
Dum la somero li ofte promenadis.
La dikulo manĝadas dum la tuta tago.
Mi aŭdis la fluadon de akvo tie.

broso

Ŝi prenis la broson kaj brosadis la pantalonon.
Ni aŭdis pafon kaj poste longan pafadon.

INTERPAROLADO:

Demandoj per KIEL KAJ KIA.

HEJMA TASKO: Kopiu kaj respondu per plenaj frazoj:
-Kio estas la organo de vidado?
Kio estas la organo de tuŝado?
Kio estas la organo de flarado? kaj de gustado? kaj de palpado?

- Donu la e-formon kaj traduku:
rapida, gaja, subita, pura, terura, sekura.

.-.-.-.-.-.-.-.-.

19-a LECIONO - ilo

- I L O

ILO estas tio, kio servas por fari ion.



Oni kudras per kudrilo kaj per kudromaŝino.
La montriloj montras la horojn sur la horloĝo.
Oni kombas per kombilo.



Oni rastas per rastilo.
Oni veturas per veturilo.

Oni tondas per tondilo.

rastilo

Oni hakas per hakilo.

Oni segas per segilo.



fosilo

Oni balaas per balailo.
Oni tranĉas per tranĉilo.



Glitveturilo glitas sur la neĝo.

La geknaboj surmetas la glitilojn kaj glitas sur la blanka kaj brila neĝo.

INTERPAROLADO: Pri la menciitaj frazoj.
HEJMA TASKO: a) Respondu per plenaj frazoj:
KIO estas montrilo?
Kio estas tondilo?
Kio estas fosilo?
Kio estas segilo?
Per kio oni veturas?
Per kio oni glitas?

b) Kion oni bezonas por:

kudri	ludi	segi
tondi	skribi	marĵeli
manĝi	kombi	ŝraubi
balai	tranĉi	ŝoveli?

gliti sur la neĝo?

c) - Traduku la ilojn por

rasti
fosi

.-.-.-.-.-.-.-.

DUDEKA LECIONO

-aĉ - A Ĉ

Esperanto literaĉoj

Ĉevalo maldika kaj malbela estas ĉevalaĉo. Malnova kaj ruinigita domo estas domaĉo. Strato plena de truoj estas stratoĉo. Virino maljuna, malbela kaj malbone kaj malpure vestita estas virinaĉo. Ŝnuro malnova kaj ŝirebla estas ŝnuraĉo. Vendejo malgranda kaj malriĉa estas butikaĉo. Kiu skribas per malbelaj literoj, skribas per literaĉoj.

-mis

- M I S

Se via prononco estas malbona, vi misprononcas.

Se oni diras ion kaj vi aŭdas alion, vi misaŭdis. Se vi skribas vorton kaj eraras literon, vi misskribas. Se via kalkulo estas erara, vi miskalkulis.

Se vi paŝas sur ŝtono kaj faletis, vi mispaŝis.

- E R - er

La mebloj estis kovritaj per polveroj.
Multaj akveroj ŝpruĉis sur nin.
La monujo estis plena de moneroj.
Atendu min tempere.
La fraŭlino ĵetis panerojn al la fiŝoj, kiuj naĝis en la lago.
Kiam la glitveturilo haltis, saltis neĝerojn.

INTERPAROLADO:

Faru demandojn por la frazoj de la teksto.
Ekzemploj: Kio okazas, kiam la vento blovas?
Kion ĵetis la fraŭlino?
Kio okazis, kiam la glitveturilo haltis?

HEJMA TASKO: Respondu, per kompletaj frazoj:
- Kiu skribas per literaĉoj skribas bele?
- Se Johano mislegas ĵurnalartikolon, ĉu oni povas ĝin kredi?
- Kion la fraŭlino ĵetis al la fiŝoj?
- Kio saltis, kiam la veturilo haltis?

.-.-.-.-.

DUDEK-UNUA LECIONO

ANTIKVAJ KAJ MODERNAJ VETURILOJ

Durada estas la ĉaro.
La kamparano

forte vipas la bovojn per vipo.



La trajno kuras sur la reloj. Nigra fumo kovras la ĉielon. La lokomotivo iras antaŭ la vagonaro.

Sur la velŝipo, la veloj estas fiksitaj ĉe la mas_to.
La vento ŝovas la velŝipon.





La tramo estas elektra veturilo.

La stiristo stiras la buson.



Motorbiciklado estas danĝera veturado.

La aviadilo rapide iras inter la nuboj, kiel granda metala birdo.

KONVERSACIO

Lernanto faru demandojn pri la teksto, alia respondu per kompleta frazo.
Ekzemplo: Kia veturilo estas la tramo?
Ĉu motorbiciklado estas sendanĝera veturado?
Kio ŝovas la velŝipon?
Per kio la kamparano vipas la bovojn?

HEJMA TASKO - Metu la frazojn de la teksto en demandajn formojn.

.-.-.-.-.-.-.-.

DUDEK - DUA LECIONO

-iĝ - I G - I Ĝ -iĝ

La knabo purigis siajn dentojn.
La karbo nigrigis la manojn de ĉiuj.
La suno blankigis la tolon.
Vintro glaciigis riveron.
La patrino enlitigas la infanon.
La novaĵo ŝtonigis ĉiujn.
Frue li enbusigis la pakaĵojn.
La profesoro audigis longan riproĉon.
Per rigardo li hontigis la ĉeestantojn.
La troa marŝado lacigis la marŝantojn.
La advokato klarigis la leĝojn.



sitelo

La servistino plenigis la sitelon.

La suno maturigas la frukton.
La anekdoto ruĝigis la fraŭlinon.

- I G - iĝ

La sitelo pleniĝis. La spegulo rompiĝis.
Ili sidiĝis. Ĉiuj grupiĝis en la ĝardeno.
Virinaj larmoj baldaŭ sekiĝas.
La tranĉilo malakriĝas per la rusto.
La parencaro kuniĝis en la granda vilao.
La pordo fermiĝis je la sepa.
Pro la malbonaj vortoj li ĉagreniĝis.
La vizitantoj varmiĝis ĉe la fajro.
La vino elverŝiĝas. La infano enlitiĝis frue.
La vestoj de la monaĥinoj moderniĝis.
La kampoj blankiĝis per neĝo.
En la vintro la rivero glaciiĝis.
Vintre la rivero glaciiĝis.
Vintron la rivero glaciiĝis.

INTERPAROLADO:

- Bonvolu traduki la frazojn:
La lampo lumigas la ĉambron. La ligno brulas.
- Kion signifas la frazoj?
Mia patrino boligas la teon.
La skolto ekbruligos la tendarfajron.
- Traduku, mi petas:
La fraŭlino fermas la pordon. Pordo fermiĝis.
La mano moviĝas. La studhoro baldaŭ finiĝos.

HEJMA TASKO: Plenigu la blankojn per ig aŭ iĝ:
Paulino plen( )is la glason per akvo.
Paulo mort( )is sin.
Nokte la bestoj kuŝ( )is en sia nesto.
La patrino sid( )as la fileton kaj poste ŝi sid( )as.
La vartistino kuŝ( )as la bebon kaj poste kuŝ( )as.
Post la pluvo la puto plen( )as.
Por la pikniko ĉiuj pret( )as frue.
Se ili malfru( )os, ili ne povos eniri.

DUDEK-TRIA LECIONO

- ej

Oni lernas en la lernejo.
Oni dormas en la dormejo.
Oni manĝas en la manĝejo. Oni preĝas en la preĝejo. Oni naĝas en la naĝejo. Oni aĉetas en la aĉetejo; ankaŭ en la butiko, en la magazeno kaj en la vendejo oni aĉetas. Adamo invitis min kuniri al dancejo por iomete danci.

En la telefonejo oni telefonas.

En la ĉevalejo restas la ĉevalaro.

Bruno banas sin en la banejo.

Li prenas duŝon en la duŝejo.

Li banas sin per duŝo.

- E S T R - estr

En la ŝipo laboras la ŝipestro, la maristoj kaj la tuta ŝipanaro.

En la ŝipo laboras la maristaro.

La fabrikestro ne volas altigi la salajron de la laboristoj. La gelernantoj ricevis notojn de la lernejestro. Ĉijare estos balotado por elekti la urbestron de Porto Alegre. Ĉiu muzikisto rigardis la muzikestron por ĝuste komenci la ludadon.

INTERPAROLADO:
(Per la menciitaj frazoj).
Ekzemplo:
- Kie laboras la maristo?
- Kiu estras en la ŝipo?
- Per kio Bruno banas sin?

HEJMA TASKO:Respondu la jenajn demandojn:
- Kion signifas la vortoj: naĝejo, dormejo, aĉetejo, telefonejo?
- Kion vi vidas sur la bildo?

2, Skribu la demandojn, kies respondoj estas:

..... ? - Jes, en la ŝipo estras la ŝipestro.
..... ? - Ne, la fabrikestro ne volas altigi la salajrojn.
..... ? - Jes, la gelernantoj ricevis la notojn de la lernejestro.
..... ? - Por elekti la urbestron de POA.
..... ? - Ĉar Bruno estis malpura.
..... ? - En la banejo.

.-.-.-.-.-.

DUDEK-KVARA LECIONO

PERSONAJ PRONOMOJ

MI estas knabo
VI estas knabino
LI estas alia knabo
ŜI estas alia knabino
ĜI estas hundo aŭ domo
NI estas kuzoj
VI estas miaj avoj
ILI ankaŭ estas parencoj.

POSEDAJ PRONOMOJ

MIA domo estas malproksima
VIA jako estas verda
LIA vizaĝo estas gaja
ŜIA hararo estas blonda
ĜIA vosto estas longa; la domo kaj ĝia pordo.
NIA voĉo estas laŭta
VIA libro estas broŝurita
ILIA veturilo estas rapida

AKUZATIVAJ PERSONAJ PRONOMOJ

MI	MIA	MIN
VI	VIA	VIN

LI	LIA	LIN
SI	SIA	SIN
GI	GIA	GIN
NI	NIA	NIN
VI	VIA	VIN
ILI	ILIA	ILIN

Mi vidas min sur la spegulo.
Mi vidas vin tra la fenestro.
Mi vidas lin kun ĉapelo.
Mi vidas sin sen ĉapelo.
Mi vidas gin kun granda osto.
Mi vidas nin dikaj sur tiu spegulo.
Mi vidas ilin.

Infaneco

Maljuneco

- E C -ec

Abstraktan ideon de kvalito aŭ stato donas la sufikso -EC

bela - beleco	amiko - amikeco
granda - grandeco	homo - homeco
sola - soleco	ligno - ligneca
frato - frateco	silko - silkeca
ŝtono - ŝtoneca	vitro - vitreca

La beleco de la nokto ravis nin. Pligrandiĝis la soleco, kiam mi eniris la dezerton. Pruvo de amikeco estas via ĉeesto. Sia haŭto montriĝis ligneca. Silkeca estis la hararo de Anjo. Mi ne havas eblecon viziti vin.

REFLEKSIVOJ { SI / SIN / SIA

Ekzemploj:

MI		
vi		
li		Ŝi rigardis al si sur la spegulo.
ŝi	si	Li kombas al si la harojn.
ĝi		Ĉiuj laboras por si mem.
ni		
vi		
ili	si	
min		
vin		
lin		Ŝi beligas sin.
ŝin	sin	Ĝi lavas sin.
ĝin		Ili kisis sin.
nin		La simietoj ungogratis sin dum la
vin		tuta tago.
ilin	sin	
mia		-Diana vidis la fratinon kun sia ĉa-
via		pelo (la ĉapelo estas de Diana).
lia		-Diana vidis la fratinon kun ŝia ĉa-
ŝia	sia	pelo (la ĉapelo estas de la fratino)
ĝia		-Johano petis de Maria sian libron.
nia		(la libro estas de Johano).
via		-Hohano petis de Maria ŝian libron.
ilia	sia	(la libro estas de Maria).

Ili parolis al Maria pri ŝia kuzo; (la kuzo de Maria). Ili parolis al Maria pri sia kuzo;(kuzo de ili).

sia = seu próprio, sua própria, deles próprios.

INTERPAROLADO:

(Pri -ec kaj pri refleksivoj)

Ekz.: -Ĉu li renkontis la fratinon kun sia/ŝia jako?

-Ĉu li vidis la amikon kun sia/lia libro?

HEJMA TASKO

-Formu la -ec-formon de: bela, alta, granda, verda, blanka, pura, naiva, krudela.

-Traduku ilin.

-Kompletigu:

Eu me vejo no espelho: Mi vidas ___ en la spegulo

Ele não se vê, porque está atrás do espelho:
Li ne vidas ____, ĉar li estas malantaŭ la spegulo.
Tu te lavas ou alguém te lava?
Ĉu vi lavas ____ aŭ iu lavas____?
Mariazinha já se lava, sua mãe já não a lava.
Manjo jam lavas ____; ŝia patrino jam ne lavas ___.
Ele feriu-se. Li mem vundis ____.
Você mesmo se penteia ou a penteadeira o penteia?
Ĉu vi kombas ___ mem, aŭ la frizistino kombas ___?

.-.-.-.-.-.

DUDEK-KVINA LECIONO

MEBLARO KAJ MANĜADO



La meblaro de la ĉambro konsistas el sofo kaj du brakseĝoj; bretaro kun kvin bretoj kaj telermeblo.

La tablo estas en alia ĉambro. Sur la tablo estas teleroj, kuleroj, forkoj, tranĉiloj; glasoj, tasoj, subtasoj, buterujo; kafkruĉo kaj laktkruĉo.

Antaŭ eliri al la lernejo mi matenmanĝas: mi trinkas lakton kun kafo, buterpanon, fromaĝon kaj ĵeleon.

Plaĉas al mi tritika pano, maiza pano kaj sekala.

Je tagmezo mi revenas hejmen (al mia hejmo) kaj tagmanĝas. Mi ripozas iomete kaj poste mi lernas. Je la kvara estas lunĉo. Poste mi ludas kune kun miaj najbaraj amikoj.

Je la sepa mi vespermanĝas; poste mi rigardas televidajn programerojn. Mi enlitiĝas je la naŭa kaj duono.

Mi ŝatas legi. Legi plaĉas al mi.

Kiam K I A M

Kiam ni eniras buson, ni enbusiĝas.
Kiam ni eliras buson, ni elbusiĝas.
Kiam ni eniras en ŝipon, ni enŝipiĝas.
Kiam ni eliras el ŝipo, ni elŝipiĝas.
Kiam ni alvenas al tablo por manĝi, ni altabliĝas.

INTERPAROLADO:

Kiam vi komencis la lernadon de Esperanto?
Kiam vi naskiĝis?
Kiam vi konatiĝis kun via kolegino?
Kiam la leciono finiĝos?
Kiam vi iros hejmen? Kiam vi libertempos?
Kiam vi enlitiĝas?

HEJMA TASKO: Kopiu kaj respondu skribe la demandaron. de la INTERPAROLADO.

2. Esperantigu: Jacob construiu sua própria casa.
O cão lançou-se no rio.
Tito e Timóteo convidaram seus parentes para almoçar.
Tadeu gosta de ver sua irmã com sua saia azul.

VORTARETO

Konstrui = contruir
lançar = ĵeti
gostar de = ŝati
saia = jupo
convidar = inviti

.-.-.-.-.-.-.-.

DUDEK-SESA LECIONO

EGALECA KOMPARATIVO

tiel ... kiel

Judito estas tiel eleganta, kiel Magdaleno.

Nenio estas tiel valora, kiel la sano.
Esperanto estas tiel bela, kiel utila.
Tiu ĉevalo estas tiel rapida, kiel lokomotivo.

pli ... ol — SUPERECA KOMPARATIVO

Elefanto estas pli granda ol kamelo.
Pajlo estas pli malpeza ol plumbo.
Maro estas pli bela ol rivero.

malpli ... ol — MALSUPERECA KOMPARATIVO

La limako estas malpli rapida ol la leporo.
Aglo flugas malpli alte ol aviadilo.

plej ... el — RELATIVA SUPERLATIVO

Magdaleno estas la plej dika el la gefratoj.
Porto Alegre estas la plej simpatia el la ĉefurboj.



La kvina arbo estas la plej alta el la arboj.

.-.-.-.-.-.-.-

Tiel blanka, kiel nego.
Tiel rapida, kiel fulmo.

INTERPAROLADO:

(Pri la diritaj frazoj)

HEJMA TASKO: Escreva uma frase com:

a) comparativo de igualdade
b) comparativo de superioridade
c) comparativo de inferioridade
d) superlativo relativo

Uzu la vortojn:seka, florplena, parfumita, edukita, inteligenta.

.-.-.-.-.-.-

DEDEK-SEPA LECIONO

AKUZATIVO (II)

a) Vimos até aqui que a letra -n no fim da palavra indica objeto direto. Ex.: Mi manĝas bananon. Neste caso não pode haver preposição.

b) O -n no final da palavra pode mostrar direção. Virá, então, sempre com verbo de movimento e equivalerá à preposição al (para). Ex.-
Mi vojaĝos eksterlanden. Mi iras hejmen.
Mi veturos tien. Kien mi iros?

Pode ocorrer o -n com preposição. Neste caso o verbo é de movimento e a preposição será de lugar ou de posição (sub, sur, en...)
O -n indica que a palavra é alvo de movimento (celo de movo). Ex:

LA KOKIDO KURAS SUB LA TABLO signifas, ke la kokido estas sub la tablo kaj kuras.

Tamen se oni diras:

LA KOKIDO KURAS SUB LA TABLON signifas, ke la kokido ne estis sub la tablo, sed ke ĝi kuras al sub la tablo.

Alia ekzemplo:

LA KNABO SALTAS EN LA NAĜEJO signifas,ke la knabo estas en la naĝejo kaj saltas.

Tamen se oni diras:

LA KNABO SALTAS EN LA NAĜEJON signifas, ke la knabo

ne estis en la naĝejo, sed ke li saltas "al" la naĝejo.

.-.-.-.-

Rimarku la diferencon inter la frazoj:
Mi veturis en Parizo.
Mi veturis en Parizon
Li marŝis en ĝardeno.
Li marŝis en ĝardenon.
La pendolo iradis tien kaj reen.

c) -n povas anstataŭi prepozicion.
Ekzemploj:
Mi dormis dum ok horoj: Mi dormis ok horojn.
Dum la vintro multe pluvas: Vintron multe pluvas.
Porto Alegre, je la tria de oktobro de 1986.
Porto Alegre, la trian de oktobro de 1986.
En printempo abundas floroj.
Printempon abundas floroj.

.-.-.-.-.-.-.-

RESUMO DE AKUZATIVO

a) - rekta objekto: Mi manĝas bananon.
b) - de direkto : Mi vojaĝos Parizon.
Salti en la kuvon.
c) - anstatauas prepozicion: La tutan tagon.

HEJMA TASKO: a) UZU AKUZATIVON ANSTATAU PREPOZICIO:
En la dimanĉo li ne ŝatas labori.
Dum somero mi iras al plaĝo.
En la nokto mi aŭdis timigan bruon

B) UZU AKUZATIVON DE DIREKTO:
Mi iras al la ĝardeno.
Ŝi veturas al Romo.
La onklo naĝis al la insulo.

C) METU AKUZATIVON ĈE LA REKTA OBJEKTO:
Ili tuj sentis la parfumo de la frukto.
La najbaro rajdas nigra fortika ĉevalo.
Ŝi estas eleganta virino.
Ĉiuj sentis odoro de rostita viando.

.-.-.-.-.-.-.

DUDEK-OKA LECIONO

Kial? ... ĉar KIAL? ... ĈAR

Kial Petro manĝas? - Petro manĝas ĉar li malsatas.
Kial Petro trinkas? - Petro trinkas ĉar li soifas.
Kial Tomaso ne ridas? - Tomaso ne ridas, ĉar li estas malgaja.
Kial vi ne venis pli frue? - Mi ne venis pli frue, ĉar mi ne povis.
Kial vi kuŝas? - Mi kuŝas ĉar mi estis laca.
Kial vi malĉeestis? - Mi malĉeestis ĉar mi estis malsana.
Kial vi venis tiel malfrue? - Mi venis tiel malfrue ĉar mi renkontis amikon.
Kial li ne lernis la lecionon? - Li ne lernis la lecionon ĉar li sentis kapdoloron
Kial vi ŝatas Esperanton? - Mi ŝatas Esperanton, ĉar ĝi estas lingvo de unuiĝo kaj frateco.
Kial vi eliras tiel frue? - Mi eliras tiel frue, ĉar mi volas frue alveni hejme.
Pro kio vi ne venis? - Pro malsano (kaŭzo).
Por kio vi venis? - Por vidi vin kaj babili iomete (celo).

.-.-.-.-.-.-.

INTERPAROLADO:

La gelernantoj duope faros demandojn unu la alian, pri legitaj frazoj.

HEJMA TASKO:

a) Kiam oni diras KIAL kaj kiam oni diras ĈAR?
b) Respondu per plenaj frazoj:
Kial kantas Napoleono?
(... porque ele está alegre).
Kial Rozalio petis pardonon?
(... porque ela agiu mal)
Kial oni bezonas pluvon?
(... porque a terra está seca).
c) Esperantigu:
- Por que não vieste ao baile?
- Não vim ao baile, porque feri meu pé.

.-.-.-.-.-.-.-.

DUDEK-NAŬA LECIONO

PARTICIPOJ



LA KNABO KAJ LA FENESTRO
La knabo fermos la fenestro.
Oni diras ke la knabo estas fermonta.
kaj ke la fenestro estas fermota.

LA KNABO FERMAS LA FENESTRON.
Oni diras ke la knabo estas fermanta
kaj ke la fenestro estas fermata.

LA KNABO FERMIS LA FENESTRON.
Oni diras ke la knabo estas ferminta
kaj ke la fenestro estas fermita.

LA KNABO KAJ LA AKVO

LA KNABO KAJ LA AKVO

Kiam la knabo trinkas akvon, li estas trinkanta.
kaj la akvo estas trinkata.
Kiam la knabo trinkis akvon, li estas trinkinta
kaj la akvo estas trinkita.
Kiam la knabo trinkos akvon, li estas trinkonta
kaj la akvo estas trinkota.

LA KNABO KAJ LA ĈOKOLADO

manĝonta infano
manĝota ĉokolado

manĝanta infano
manĝata ĉokolado

manĝinta infano
manĝita ĉokolado

PROVERBO

Malbone akirita, baldaŭ perdota.

.-.-.-.-.

Uzu la tempon estantan, antaŭvidu la tempon estontan, memoru la tempon estintan.

.-.-.-.-.

AFIŜOJ

TABLO REZERVITA

VOJO RIPARATA

ENIREJO

ESTAS MALPERMESATE FUMI

ELIREJO

VOJO POR KONSTRUOTA LERNEJO

POR NEFUMANTOJ

LA HAKISTO HAKAS ARBOJN

La hakanta viro.

La hakata arbo.

- La hakita arbo.
- La hakinta viro jam eliris.

INTERPAROLADO:

- Se patrino batas infanon, kia estas la patrino?
- La patrino estas batanta.
- Kia estas la infano? - La infano estas batata.

.-.-.-.-.

- Se dika knabo manĝas kukon, kia estas la knabo?
- La knabo estas manĝanta.
- Kia estas la kuko? - La kuko estas manĝata.

.-.-.-.-.

- Se du amikoj rigardas belan pejzaĝon, kia estas la du amikoj? - La du amikoj estas rigardantaj kaj la pejzaĝo estas rigardata.
- Se unu amas la duan, la unua estas amanta kaj la dua estas amata.

.-.-.-.-.

La pentristo pentras bildon.
La pentristo estas pentranta kaj la bildo estas pentrata.

La kuiristino kuiras fiŝon.

La kuiristino estas kuiranta kaj la fiŝo estas kuirata.

La tajloro kudras jakon.
La tajloro estas kudranta kaj la jako estas kudrata.

La kantistino kantas kanzonon.
La kantistino estas kantanta kaj la kanzono estas kantata.

La razisto razas la vangon de la kliento.
Kia estas la razisto? - Li estas razanta.
Kia estas la kliento? - Li estas razata.

HEJMA TASKO

Kopiu kaj kompletigu la jenajn frazojn:

MI BATAS LA TAMBURON

1. Mi batas - Mi estas _____
2. Mi batis - Mi estas _____
3. Mi batos - Mi estas _____

MI KANTAS KANZONON

1. Mi kantas - Mi estas _____
2. Mi kantis - Mi estas _____
3. Mi kantos - Mi estas _____

1. Se nun mi kantas kanzonon, hodiaŭ la kanzono estas _____.
2. Se hieraŭ mi kantis kanzonon, hodiaŭ la kanzono estas _____.
3. Se morgaŭ mi kantos kanzonon, hodiaŭ la kanzono estas _____.

TRIDEKA LECIONO

ADVERBAJ ESPRIMOJ (Ankaŭ finiĝas per -e).

Aos domingos:	ĉiudimanĉe	em dezembro-	decembre
Aos sábados :	ĉiusabate	de vapor :	ŝipe
Em janeiro :	januare	de avião :	aviadile
Em maio :	maje	de carroça :	ĉare

de ĉnibus : buse
no outono : aŭtune
no verão : somere

no inverno - vintre
aos soluços- singulte
em agradecimento - danke.



- Kies ĉemizo estas ĉi tiu?
- Tiu ĉemizo estas mia.

- Kies ĉapelo estas tiu? - La ĉapelo estas de la sinjoro.
- Kies vestoj estas tiuj? - La jako estas de Joĉjo; la pantalono ankaŭ estas de li; la jupo estas de Anjo. La ŝtrumpo apartenas al mia fraĉjo kaj la bluzo al mia franjo.
- Kies domo estas tiu blanka? - Ĝi estas la domo de mia bopatro.
- Kies patro estas militisto? - La patro de Petro estas emerita militisto.
- Kies libroj estas sur la bretaro? - Sur la bretaro estas la libroj, kiujn mi aĉetis.
- Kies naskiĝon vi festas? - Kies verkon vi tradukas? La arbo, kies frukto vi manĝis, estas en mia korto. La knabo, kies patro surmetas verdan ĉemizon, estas nomata Jakobo.
  Paĉjo ĉiam promenis kun ni dimanĉe matene kaj panjo kantetis ĉe nia lito por ekdormigi nin.
  La kato scias, kies lardon ĝi manĝas.
  La edzino de mia onklo Geraldo estas mia amata onjo Henrikino.
- Kies domo estas tiu?

Kies kravato es tas ĉi tiu? Mi ĝin trovis sur la seĝo kune kun mia ĉemizo, en la dormoĉambro. Mia ĝi ne estas. Bonvolu, for - porti ĝin al ĝia posedanto.

kravato
kolumo
ŝtrumpoj
strumpetoj

INTERPAROLADO:

(pri vestoj)

HEJMA TASKO; Portugaligu la antaŭan tekston (nur la demandoj n).

2. Traduku:
   Peĉjo estas karesa formo de Petro.
   Joĉjo=Johanĉjo=Hanĉjo, de Johano.
   Paĉjo,de patro;oĉjo,de onklo
   Panjo,de patrino; onjo, de onklino.

TRIDEK-UNUA LECIONO

- Kiam vi metis ĉi tiun ŝuon sur mian liton?

Antaŭ kelkaj minutoj ĝi tie ne estis. Vi mismetas viajn vestojn ĉiutage. Kial vi ne zorgas pri viaj aĵoj? Nia hejmo estas ĉiam senordigita. Mi de matene ĝis nokte ordigas la vestojn, la meblojn, la manĝilaron - vi nur malordigas ĉion.

Kiam vi pli bone agos?
Kiam vi estos bona kamarado?
Kiam vi helpos min ĉe mia hejmlaboro?

Vi ne plu estas knabo; kiam vi naskiĝis?
Antaŭ pli ol dudek jaroj, ĉu ne?
Vi misaŭdis ĉion, kion mi diras kaj misagas.
Vi miskomprenas tion, kion mi petas al vi.
Vi miskondutas ĉe ĉiuj okazoj...

... sed ne rigardu min per tiu vizaĝeto aŭ mi petas vian pardonon kaj silentas.

R E - *re -*

a)

DENOVE: Ĝis revido! Mi diras kaj rediras!
Tiel plaĉis al mi ĉi tiu libro, ke mi relegos ĝin.

b)

DENOVA VENO AL UNUA LOKO AŬ STATO:
Mi iras hodiaŭ kaj revenos morgaŭ
Ira kaj reira bileto.
Redonu la pruntitan monon.
Li ricevis la pilkon de Marko kaj redonis ĝin al li.

INTERPAROLADO:

- Ĉu vi bone komprenis la tekston?
- Ĉu la edzino estas milda homo?
- Kiu senordigis sian veston?
- Ĉu la edzo estas bona kamarado?
- Ĉu la edzo helpis la edzinon ĉe la hejmlaboro?
- Ĉu vi helpas ĉe hejmlaboro, en via hejmo?
- Ĉu la afero finiĝas bone?
- Ĉu vi opinias, ke la edzo pliboniĝos?

- Ĉu vi misskribas viajn leterojn?

HEJMA TASKO: Kopiu la demandojn faritajn en la monologo kaj respondu ilin. (Vi estas la edzo).

.-.-.-.-.-.

TRIDEK-DUA LECIONO

- U S -US

Se mi havus monon,
mi vojaĝus Romon.

-US: Kondicionalo.
- Subjunktiva Modo ne ekzistas en Esperanto, oni ankaŭ uzas la finaĵon- US.

Se mi scius, mi dirus.

Oni uzas la finaĵon-US, por esprimi kondiĉon kaj supozon:

Se mi estus riĉa, mi donus monon al E-o-Klubo.
Se vi volus, vi povus.
Mi povus peti, kion mi volus.
Se la lando havus bonajn vojojn, mi veturus.
Se vi dirus, mi scius.
Se mia loteria bileto estus premiita, mi vojaĝus aviadile.

.-.-.-.-.-.

- O S -OS

"Futuro de Subjunktivo" ne ekzistas en Esperanto.
Estas nur unu tempo Futuro: -OS-tempo.
Ekzemploj:

- Se vi havos okazon, ne forgesu skribi.
  (Se tiver ocasião, não esqueça de escrever).
- Se vi lernos, vi venkos.
  (Se você estudar, vencerá).
- Se mi povos, mi iros.
  (Se eu puder, eu irei).
- Kiel vi decidos, tiel mi agos.
  (Como você decidir, assim eu farei).
- Kiam mi revenos, mi pli bone parolos al vi.
  (Quando eu voltar, falarei melhor com você.

U-MODO = VOLITIVO -u

Volitivo respondas al imperativo (en ĉefa propozicio) aŭ al subjunktivo (en dependa propozicio).
Ĝi povas esprimi peton, ordonon, deziron, volon.
Ĉiam entenas ideon de celo (finalidade).
Ekz. : Mi petas, ke li venu.
Estas necese, ke li restu.
Mi malpermesas ke li diru. Volu Dio!
Permesu al mi prezenti miajn amikojn. Mi ordonas ke li eliru.Donu al mi almozon. Mi volas ke li venu. Estu forta kaj sana. La instruisto petas la lernantojn, ke ili restu silentaj. La patrino konsilas al la gelernantoj, ke ili lernu duope.



T R A



T R A N S

La suno brilas tra la branĉoj.
La vagonaro iras tra la tunelo.
Ili loĝas trans la rivero. Eŭropo situas trans la oceano. La judoj estis dum 40 jaroj tra la dezerto: trans la dezerto estis la Promesita Lando.

Tra unu orelo ĝi eniras,
tra la dua ĝi eliras.

INTERPAROLADO:

Ĉu vi ŝatas futbalon?
Plaĉas al vi marŝado tra la kamparo?
Ĉu vi komprenis la uzadon de -US-MODO, -OS-MODO kaj de -U-MODO?
Ĉu vi jam vizitis Nigra-Lagon en la urbo Gramado dum la epoko de hortensio? Ĉu vi ĝin vizitis dum la epoko de azaleo? Kiu estas la plej bela pejzaĝo?
HEJMA TASKO : a) - Kopiu la frazojn de la lecio no US-VERBO kaj portugaligu ilin.
b) Elektu 3 verbojn kaj metu ilin je la konataj verbaj formoj. Ekz.:

	Presente	Passado	Futuro	Condicional	Volitivo
ami	amas	amis	amos	amus	amu
vidi	vidas	vidis	vidos	vidus	vidu

c) - Faru frazojn entenantajn U-MODOn
a) (peto)
b) (deziro)
c) (ordono)
d) (volo)

.-.-.-.-.-.-.-.

TRIDEK- TRIA LECIONO

KORESPONDADO:

CU NI IRU SKRIBI LETERON ?

Vi devas aĉeti paperon, koverton, skribilon, poŝtmarkojn.
Poste vi devas elekti esperantiston(aŭ esperantistinon) por esti via korespondanto (aŭ korespondantino).
En esperantaj gazetoj aŭ revuoj vi trovos multajn anoncetojn pri gesamideanoj.
Unue vi skribu la daton:
Porto Alegre, en la dua de januaro de 1986 (aŭ)
Porto Alegre, la duan de januaro de 1986 (aŭ)
Porto Alegre, je la dua de januaro de 1986 (aŭ)
Porto Alegre la 2ª de januaro de 1986.

Due skribu: Estimata Samideano (aŭ)
Amiko mia (aŭ)
Mia nova Amiko.

Trie elektu unu el tiuj leterkomencoj (aŭ alia):
Mi legis en la revuo ... vian anonceton pri kores - pondado (aŭ)
Ĝoje mi vidis en la revuo ,,, vian deziron korespon di kun brazilano (aŭ)
Mia instruisto donis al mi vian adreson.

Kvare parolu pri vi mem: Mi estas brazilano, 3o jaraĝa, telegrafisto, edzo (aŭ fraŭlo) kaj havas 2 gefilojn. Mia lernado de Esperanto komenciĝis antaŭ 2 jaroj kaj mi ĝuas la korespondadon de gesa mideanoj el kelkaj landoj.

Fine metu la leterfinon: elektu unu el la jenaj (aŭ alia): Kore; Via amiko; Tre amike; Salutojn;
Korajn Salutojn. Brakumas vin;

RIMARKO: Tajpu aŭ skribu bone legeble.
Ne forgesu tre klare skribi vian adreson.

INTERPAROLADO:

Ĉu plaĉus al vi korespondi kun ĉina samideano?
Ĉu plaĉus al vi korespondi kun parizanino?
Ĉu plaĉus al vi korespondi kun budhisma monaĥo?
Ĉu vi ŝatas paroli pri muziko? pri kutimoj?
pri sporto? pri modoj?
pri politiko?
pri naciaj kostumoj?

Ĉu vi opinias, ke korespondado estas interesa hobio?
HEJMA TASKO: Skribu plena letero al korespondant-(in)o. Ĝi povas esti la unua aŭ sekva letero.

.-.-.-.-.-.-.-.

TRIDEK-TRIA LECIONO (A)

- ehs

- E K S

Kiu estis mia kolego, tiu estas mia ekskolego.
Kiu ne plu estas direktoro, tiu estas eksdirektoro.

Rio de Janejro estas eksĉefurbo de Brazilo.

Kiu ne plu estas reĝo, estas eksreĝo.

Li ne plu estas urbestro: li estas eksurbestro.

kolumo

manumo

-um

- U M

Suf.sen difinita senco por derivi vortojn.

butono — butonumi

La ĉemizo havas nur unu butonon: mi ne povas butonumi ĝiajn manumojn kaj kolumon. Mi frumatene akvumas la bedojn. Pro aĵeto en sia okulo, ŝi multe palpebrumis. Li frate brakumis sian amikon. La bona ŝtelisto ankaŭ estis krucumita. Bona lernanto plenumas sian taskon. Johano foliumas la libron por trovi la tekston.

Li malvarmumis.

fi -

Pref.esprimanta malestimon. Fiinsekto=inseto prejudicial.

Se oni diras, ke iu estas fikomercisto, oni diras, ke li estas "negociante desonesto".

Se oni diras, ke homo havas fibuŝon, signifas, ke el tiu buŝo eliras malbonaj vortoj.

Se oni diras ke hundo estas hundaĉo, oni volas diri, ke la hundo estas malbela, maldika, malpura, maleleganta... sed se oni diras, ke hundo estas fihundo, la hundo estas malfidela al sia mastro, la hundo ne estas fidinda.

-IND *-ind*



Nia infaneto jam estas nun sep jaraĝa. Ni faris kukon kun ruĝaj kandele - toj kaj ornamaĵoj multkoloraj: bluaj, verda, flavaj, rozkoloraj. La blonda knabino fariĝis tiel ĝoja! La sceno estis vidinda!

Tiu pejzaĝo estas rigardinda. La libro de li verkita estas leginda libro. Mi vidis aĉetindan pentraĵon: mi ne povas ne aĉeti ĝin.



KUNLABORO

Du azenoj estis kunligitaj.

Ambaŭ vidis sian flanke garbon de fojno.

La azenoj tiris unu la alian por pli bone alveni al la garbo.

Ili tion ne povis fari.

- Kio okazis? - pensis la azenoj.

Tiam ili kom - prenis: ambaŭ kune manĝis la fojnon unuflanke



kaj poste mangis la fojnon aliflanke.

TIO ESTAS KUNLABORO, KUNHELPO.

.-.-.-.-.-.-.-.

TRIDEK-KVARA LECIONO

- O B L

-obl

6 - 4 = 2
(ses minus kvar estas 2)

Trioblo de 2 estas 6.
Sesoblo de 5 estas 30.
okoblo de 2 estas dek ses.

- O N

-on

$\frac{10}{5} = 2$ (kvinono de dek estas du).
(aŭ: kvinone dek estas 2).

Nia infaneto jam nombras kaj kalkulas.
Li jam scipovas diri:

2 + 2 = 4
(du plus du estas kvar)

3 x 8 = 24
(trioble ok estas dudek kvar)

$\frac{6}{2} = 3$
(duono de ses estas 3).

$\frac{6}{3} = 2$
(triono de ses estas du).
(aŭ: trione ses estas 2).

- U L -ul

(Individuo karakterizata per tio, kion esprimas la radiko).

La Neĝulino kaj la Sep **Nanoj**.

ulo = indivíduo; blinda = cego; blindulo = um cego
surda = surdo; surdulo =um surdo, uma pessoa surda;
Alta = alto; altulo = uma pessoa alta.
La altulo faras neniom krom dormi.
La dikulo manĝis dum la tuta tempo. Junuloj plen igis la placon. Morgaŭ mi vizitos malsanulejon.

Estas tre belaj la antikvaj porinfanaj rakon - toj: Fingruleto, Cindrulino, Neĝulino.

.-.-.-.-.-.-.-

- E B L -ebl

(Kio povas esti farata).

La malsana bubo rigardis tra la travidebla fenestro aliajn knabojn kiuj gaje ludis (pilkludis).
Li skribis per literĉoj nelegeblaj.
La tasko estas peza sed plenumebla.
La problemo estas rapide solvebla.
La klarigoj estas facile kompreneblaj.
La akvo de tiu ujo estas trinkebla.

12 estas dividebla per 2, 3, 4 kaj 6.
Ankoraŭ ne estas tute matura la frukto, sed jam estas manĝebla. Sur la pakaĵo estis skribita:
FACILROMPEBLA.
Ĉu vi iros? - Eble.

- E N D (Kio devas esti farata).

-end

Li ne pagis pagendajn ŝuldojn. La afero estas tuj raportenda. La ordonoj de l a mastro estas nepre plenumenda. Ĉi tiu responden da letero devas esti zorge gardata.

.-.-.-.-.-.-

TRIDEK-KVINA LECIONO

- I N G

-ing

Mi metas la glavon en la glavingon;la cigaron en la cigaringon;ankaŭ la cigaredo mi metas en la cigaringon. Por skribi oni fiksas la plumon en la plumingon.

Kiam ŝi kudris, por ne vundi la fingron, la kudristino surmetas fingringon.

La rajdisto metas la piedojn en piedingon por apogi sin, kiam li rajdas.

kandelo



KANDELINGO

.-.-.-.-.-.-

P R A - pra-

(montras primitivecon)
praarbaro
prahomo

Montras antaŭ kaj poŝt tempecon. Ekz.:praavo = bisavô; prapatroj= antepassados; prafiloj = descendentes; pranepo = bisneto; prapranepo = tetraneto;prapraavo= tetravô.

.-.-.-.-.-.-.

E K -ek- AGo komenciĝanta aŭ momenta.

- La suno ĵus aperis: Ĝi ekbrilis. HO! - Ŝi ekkriis. "Ek al la laboro!" Subite, inter la homoj, kiuj eliris la trajnon, mi ekvidis longtempan amikon, nevidata delonge. Kiam falis la pupeto,- Marta ekploris. La nepeto eksaltis pro ĝojo. Post duonhoro la bebo ekdormis. La vento ekŝancelis la akvon. La bruna homo ekbruligis la cigaredon. La longa bruado ekĝenis la virinon. Kiam la parolanto ekparolis, ĉiuj atentis, sed baldaŭ neniu plu aŭdis lin. Se mi estas staranta kaj sidiĝas, mi eksidas. Se mi estas sidanta kaj stariĝas, mi ekstaras.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-

FINO AL MIA LATINO.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-

GAUĈAJ POPOLDIROJ

Malalta kiel flugo de kovanta anasino.
Fanfarona kiel dorlotita hundeto
Insistema kiel pulo en forlasita domaĉo.
Plorema kiel juna bovido
Senlima kiel espero de malriĉulo.
Trankvila kiel fluganta korvo en somera tagmezo.
Dika kiel hundo de kuiristino.
Malplena kiel poŝo de mortinto.

.-.-.-.-.-.-.-.-.

TRADUK-DIKTATOJ

As frases, ditadas em português, deverão ser escritas pelos alunos em ESPERANTO. A correção será feita pelos próprios alunos à vista do texto.

APÓS A 5a. LIÇÃO: La patro kaj la patrino sidas sur la seĝo ĉe la tablo. Inter la bopatrino kaj la bofilo estas vazo. La kurteno estas blanka. La knabo kaj la knabino iras al Zoologia Ĝardeno. La tigro estas sovaĝa besto. La persikujo donas persikon. La oranĝo estas dolĉa kaj la citrono estas acida. Printempo estas gaja sezono. Estas varme. Estas malvarmo en vintro.

APÓS A 10a. LIÇÃO: La unua monato de la jaro estas januaro. La viro vendis la aŭtomobilon kaj aĉetis domon. Ludoviko lernis la lecionon. La ŝranko estas plena de vestoj. Hieraŭ pluvis. La pupo kun siaj grandaj okuloj sidis sur la planko. La botelo kaj la glasoj estis sur pleto. La benkoj estas unu kontraŭ la alia. La taso estas sur la subtaso.

APÓS A 15a. LIÇÃO: La fraŭlino havas vangojn kaj lipojn ruĝajn. Oni spiras per la pulmoj. La cerbo estas en la kranio. Ĉu la dentoj estas en la buŝo? Kiom da gefratoj vi havas? Kioma horo estas? Ĉu la ĝardenisto laboras en la ĝardeno? Per la tondilo li tondas la harojn.

APÓS A 20a. LIÇÃO: Kie laboras la maristo? Du kaj du estas kvar; duoble tri estas ses. La montriloj montras la horojn. La bongusta ŝorbeto estas el kremo. Aviadiloj flugis kvinope. Franco naskiĝis en Francujo, brazilano en Brazilo. Mi estas ano de tiu klubo. Ili promenis en la arbaro dum tri horoj. Kiel dancas la dancistino? Ni aŭdis la bruon de la kudromaŝino.

APÓS A 25a. LIÇÃO: La hakisto metas la hakilon sur la ŝultron kaj marŝas por haki la grandegajn arbojn. La mastro ligis la hundon al la seĝo, per ŝnuro. Ĉu estis Petro, kiu ĵetis ŝtonon tra la fenestro? Ĉu estas truoj sur via strato? La monujo estis plena nur de papero. Eliĝis fumo el la loko

motivo de la trajno. Je kioma horo foriras la bu so? La glaso rompiĝis.

APÓS A 30a.LIÇÃO: La ĉemizo estas malbone gladita. La vekhorloĝo sonoris. Ŝi vekiĝis. La patrino el-litigis la infanon. Dum la libertempo ne estas le-cionoj. Mi vizitas la teatron kaj rigardas belajn teatrajojn. La kino estas nomata SEPA ARTO. Pla-ĉas al mi vizitadi la kinejojn. Mi vojaĝos al Rio Ŝipe. Mi ensipigos je la sepa. La fraŭlinoj ofte rigardis sin en la spegulo. Ŝi havis silke-can hararon. Ĉu vi invitas min iri al kinejo? Ĉu vi ŝatas vidi novelon per televidilo?

.-.-.-.-.-.-.-

REVISÃO DOS AFIXOS

O texto a seguir contém quase a totalidade dos afixos (prefixos e sufixos) do Esperanto.

Procure traduzi-lo sem olhar a chave que se en contra a seguir. Observe, cuidadosamente, cada palavra, para identificar os afixos que contiver.

Antes de iniciar a tradução, recorde os afixos, cuja relação é dada em continuação.

EN KAMPARO

Lastjare mi estis en kamparo. Mi loĝis en doma ĉo, kies banejo estis la rivero. La tempo ruini-gis ĝin. Mi sentis min kiel kamparano aŭ budhisma monaĥo. Mian bopatrinon mi lasis en la urbo.

Matene mi vekiĝis je la kvina kaj duono kaj longan marŝadon mi faris, kun mia hundido; tranĉi lo ĉe talio; ĝojege mi rigardis vidindan pejzaĝon. La malrapideco de la bovinoj estis agrabla.

Mi forgesis, ke mi estas eksurbano. Sur la fo-lioj estis akveroj de roso. Mi disĵetis maizerojn al la birdetoj. La birdetoj flugis duope kaj al - portis mangaĵojn al la gefiloj: Ili estis paĉjo kaj panjo de la birdetoj. Mi aŭdadis tiujn belso-najn etulojn. La estro de la kantistoj estis la



sabiao. Plaĉis al mi forgesi la fiinsektojn kaj ek dormi sub la granda figujo, sed estis la ebleco de pluvo. Ĝi estas necesa por akvumi la vegetaĵojn.

La arbaro similis al praarbaro. Protektado pri naturo estas farendaĵo. Finiĝis la mallaboremaj tagoj. Mi devis reveni hejmen.

Mi ne miselektis mian libertempan lokon. Ĝi valoras la duoblan sumon de mono, kiun mi pagis.

.-.-.-.-.-.-.

"- Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.
- Kiu timas bestaron ne iru arbaron.
- Taksi la sanon ni lernas en malsano.
- Ne voku diablon, ĉar li povas aperi.
- Ĉiu sezono kun sia bono."

(El PROVERBARO, de Zamenhof).

.-.-.-.-.-.-.

K O R E L A T I V O J

	DEMANDOJ	RESPONDOJ			
		NECERTAJ	MONTRAJ	TUTAJ	NEAJ
objekto	kio? (o que?)	io (algo)	tio (aquilo)	ĉio (tudo)	nenio (nada)
persono	kiu? (quem?)	iu (alguém)	tiu (aquele)	ĉiu (todo, cada)	neniu (ninguém)
kvalito	kia? (q. qualidade)	ia (alguma q.)	tia (tal)	ĉia (toda q.)	nenia (nenhuma q.)
loko, en kiu	kie? (onde?)	ie (algum lugar)	tie (lá, ali)	ĉie (toda parte)	nenie (em nenhum lugar)
loko, en kiun	kien? (pª onde?)	ien (pª algum l.)	tien (para lá)	ĉien (pª toda a parte)	nenien (pª nenhum lugar)
nombro	kiom (quanto?)	iom (um pouco)	tiom (tanto)	ĉiom (tudo)	neniom (nenhuma quantidade)
maniero	kiel (como?)	iel (algum modo)	tiel (assim)	ĉiel (de todo o modo)	neniel (de nenhum modo)
tempo	kiam (quando?)	iam (certo tempo)	tiam (então)	ĉiam (sempre)	neniam (nunca)
posedo	kies (de quem?)	ies (de alguém)	ties (daquele)	ĉies (de todos)	nenies (de ninguem)
kaŭzo	kial (por que?)	ial (alguma causa)	tial (aquela causa)	ĉial (por toda a causa)	nenial (por causa nenhuma)

P R E F I K S O J

BO: parentesco por casamento: bopatro=sogro
DIS: dispersão: disdoni=distribuir
EK: começo:ekdormi=adormecer
EKS: ex: ex-diretor = eksdirektoro
FI: desprezo, repulsão: fibuŝo=boca imunda
GE: união dos dois sexos: gepatroj=pais
MAL: contrário:malgranda=pequeno
MIS: mal, errado: misaŭdi=ouvir erradamente
PRA: passado ou futuro longínquo:pranepoj=bisnetos
Praarbaro:floresta vir
RE: repetição: relegi=reler ; volta:redoni:devolver

S U F I K S O J

AC: qualidade material má:domaĉo=casebre
AD: ação repetida ou continuada:pafado=tiroteio;
parolado:discurso
AĴ: coisa concreta, objeto:trinkaĵo=bebida
AN: habitante, partidário sócio: brazilano=brasileiro; kristano=cristão; klubano=sócio de clube
AR: coleção, reunião: arbaro=floresta
ĈJ: diminutivo carinhoso masculino:paĉjo=papai
EBL: possibilidade: aŭdebla=audível
EC: qualidade ou estado: alteco=altura;fraŭleco=
celibato
EG: aumentativo: grandega=imenso
EJ: lugar destinado a: lernejo=escola
EM: tendência a : manĝema = guloso
END: dever, obrigação:farenda= que deve ser feito
ER: parcela: salero=grão de sal
ESTR: chefe de: policestro=chefe de polícia
ET: diminutivo: libreto=livrinho
ID: israelido= israelita (descendente)
katido = filhote de gato (filhote)
IG: fazer, tornar: beligi = embelezar
IĜ: fazer-se, tornar-se: beliĝi =embelezar-se
IL: instrumento: segilo=serra
IN: feminino: bovino = vaca
IND: digno de: vidinda=digno de ser visto
ING: continente parcial:kandelingo = castiçal

ISM: teoria, sistema, escola: socialismo
IST: profissão, adepto de uma teoria: artisto=artista; esperantisto = esperantista
NJ: diminutivo carinhoso feminino:panjo=mamãe
OBL: forma os multiplicativos:duoblo=o dobro
ON: forma os fracionários: duono= um meio
OP: forma os numerais coletivos: duope= em grupo de dois
UL: personifica o que diz a raiz: blindulo= um cego
UJ: continente total: sukerujo = açucareiro
formação do nome dos países: Francujo
formação do nome das plantas: fragujo=morangueiro.
UM: não possui sentido definido; serve para formar palavras derivadas: sapumi= ensaboar.

.-.-.-.-.-.-.-.-.

V O R T A R E T O

Aĉeti=comprar
adreso=endereço
agi=agir
aĝo=idade
akiri=adquirir
akurata=pontual,exato
akvumi=regar
aldoni=acrescentar
alia=outro
ananaso=abacaxi
ankaŭ=também
ankoraŭ=ainda
anonco=anúncio
anstataŭ=em lugar de
avokado=abacate
azeno=burro
babili=tagarelar
balailo=vassoura
baldaŭ=breve
bedo=canteiro
bezoni=precisar de
bildo=quadro,estampa
blonda=louro
boli=ferver
boligi=ferver(trans.)
bolpoto=panela
bonvolu=faça o favor de
breto=prateleira
bruli=queimar
bruligi=queimar(trans.)
bruna=marron, castanho
bufo=sapo
celo=finalidade
cindro=cinza
citrono=limão
ĉarma=encantador
ĉe=perto de, junto a
ĉeesti=estar presente

ĉemizo=camiza
ĉiam=sempre
-ĉj =dim.carinhoso masc.
ĉio =tudo, qualquer coisa
da =de (quant.)
demeti=despir, tirar
demandi=perguntar
interrogar
derivi=derivar
dika=gordo, grosso
diri=dizer
dis-=dispersão
duŝi=tomar banho de
chuveiro
edzo=esposo
ekbruligi=acender
elekti=escolher
emerita=aposentado
enkonduki=introduzir
enteni=conter
erari=errar
-er=partícula
esprimo=expressão
estanto=presente
estinto=passado
estonto=futuro
fadeno=fio
fajro=fogo
farti=passar(de saúde)
flari=sentir cheiro
flugi=voar
flui=fluir
foiro=feira
forko=garfo
fosi=cavar
frago=morango
frandi=saborear,ser guloso por
fraŭlo=um solteiro
fromaĝo=queijo
frue=cedo
gladi=passar a ferro
gliti=deslizar
grati=coçar
ĝui=gozar
havi=ter, possuir
hejmo=lar
hela=claro
hieraŭ=ontem
Hodiaŭ=hoje
ĥoro=coro
ĥemio=química
-ig=fazer, tornar
-iĝ=fazer-se, tornar-se
jako=casaco
je=preposição sent.indef.
jupo=saia;juna=jovem
ĵaŭdo=quinta-feira
ĵeleo=geléia
ĵeti=lançar
kaĝo=gaiola
kelka=algum
kia=que qualidade
kial=por que?
kiam=quando
kie=onde
kiel=como
kies=cujo
kiom=quanto
kiom da=quantos
kolumo=colarinho
knabo=menino
koleri=encolerizar-se
kondiĉo=condição
koverto=envelope
krom= exceto, além de,
a não ser que
kruco=cruz
kruĉo=jarra
kudri=costurar
kuiri=cozinhar
kulero=colher
kunlaboro=cooperação
kuzo=primo
laca=cansado
lando=país
lardo=toucinho
lasi=deixar
lerni=aprender,estudar
letero=carta

libertempo=férias
ligno=madeira
litero=letra
limako=lesma
loĝi=morar
ludi=brincar, jogar, representar tocar (instrum.)
maizo=milho
manĝi=comer
manumo=punho(vest.)
meti=pôr
milda=suave
mis=erradamente
monaĥo=monge
montri=mostrar
morgaŭ=amanhã
movo=movimento
muso=camundongo
muŝo=mosca
naĝi=nadar
najbaro=vizinho
naski=dar a luz
naskiĝi=nascer
nenio=nada
-nj=diminutivo carinhoso fem.
nepo=neto
nevo=sobrinho
nun=agora
ombrelo=sombrinha, guarda-chuva
oni=a gente, se
onklo=tio
-op=em grupo de
ordoni=dar ordem
paco=paz
pantalono=calça
paroli=falar
paŝi=caminhar, dar um passo
pato=frigideira
persiko=pêssego
placo=praça
plaĉi=agradar
planko=soalho
pleto=bandeja
pluvo=chuva
ponto=ponte
por=para
poŝtmarko=selo
poŝto=correios
preĝi=orar
preni=pegar
pri=sobre, a respeito de
promeni=passear
pruno=ameixa
prunti=emprestar
pura=limpa
puŝi=empurrar
putra=podre
rajdi=cavalgar
rakonto=conto
raporti=relatar,fazer relatório
ravi=encantar
renkonti=encontrar
rimarki=notar,observar
ripari=consertar
riproĉo=censura
rivero=rio
rompi=quebrar
sama=mesmo
sapo=sabão
scii=saber
segi=serrar
sekalo=centeio
sezono=estação
sidi=estar sentado
soifo=sede

stari=estar de pé
stiri=dirigir veículo
subita=repentino
supo=sopa
supozo=suposição
surmeti=vestir
ŝafo=carneiro
sekura=seguro
ŝipo=navio
ŝiri=rasgar
ŝnuro=corda
ŝorbeto=sorvete
ŝoveli= remover com pá
ŝovi=empurrar fazendo deslizar
ŝraubi=aparafusar
ŝtrumpo=meia de mulher
ŝtrumpeto=meia curta
ŝuldi=dever (dívidas)
ŝuo=sapato
tago=dia
tajloro=alfaiate
tamen=contudo
taŝko=tarefa
taŭgi=servir, ser adequado
telero=prato
terura=terrível
teni=segurar, manter
tia=tal
tiel=tão, assim
tie=lá, ali
tio=aquilo
tiom= tanto
tosto=brinde, saúde
tranĉi=cortar
trinki=beber
tro=demais
troa=excessivo
trovi=encontrar
tuj=logo
imediatamente
varmo=calor
varti=cuidar de criança
velo=vela (mar.)
vico=vez, fila
vinbero=uva
vipi=açoitar
vojaĝo=viagem
vojo=estrada
volo=vontade
vulpo=raposa
vundi=ferir
zorgi=cuidar

.-.-.-.-.-.

E N H A V O

A Língua Esperanto - Pronúncia - Saudações
Algumas Expressões; -IN, BO-, Parencaro..... 4
KIO, GE-, -IDO, Zoologia Gardeno..... 6
KIE, KIA, -UJ, Kreskajoj 8
Sezonoj de la Jaro 10
Monatoj de la Jaro 11
Akuzativo (I) ..... 12.
DIS-, Tagoj de la Semajno 14
KIOM, KIOM DA, KIOMA 16
Prepozicioj 17
Homa Korpo 18
-EM, ONI 20
-ISTO, Metioj kaj Profesioj 21
Nombroj, Horlogoj 22
-ON, -AJO, -OP, -UJ, -AN 24
-ET, -EG, -AR 28
KIEL, -AD 29
ILO 30
-AC, MIS-, -ER 32
Antikvaj kaj Modernaj Veturiloj 33
-IG, -IĜ 35
-EJ, -ESTR, ... 37
Personaj kaj Posedaj Pronomoj, -EC 38
KIAM, Meblaro kaj Manĝadoj 41
TIEL...KIEL; PLI... OL; PLEJ...EL 42
Akuzativo (II) 43
KIAL? ... ĈAR 45
Participoj 45
Adverbaj Esprimoj 49
KIES, -ĈJ, -NJ 5o
MIS-, RE- 51
Condicional, Futuro, Imperativo 53
Correspondência (Korespondado) 55
EKS-, -UM, FI-, -IND 56
-OBL, -ON, -UL, -EBL, -END 59
-ING, PRA-, -EK 61
Traduk-ditatoj 63
Revisão dos Afixos (EN KAMPARO) 64
Quadro dos Correlativos 66

Prefiksoj (prefixos) 67
Sufiksoj (sufixos) 67
Vortareto (Vocabulário) 68
Enhavo (Índice) 72

.-.-.-.-.-.-.-.